Christian Morgenstern,

La suspiro

tradukita de Manfredo Ratislavo

Suspiro glitkuris sur nokta glaci'
kaj sonĝis pri amo kaj ĝojo.
Kaj brilis neĝblanke, dum glitis ĝi,
la domoj jen apud la vojo.

Sed kiam ĝi pensis pri kara knabin',
ekardis kaj sinkis ĝi tiam -
tra l' fandiĝanta glacio – kaj ĝin [2]
neniu ekvidis plu iam.

Traduko de la Germana poemo "Der Seufzer" de CHRISTIAN MORGENSTERN *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1985-02.*

Arg-77-151 (2004-01-28 19:06:09)

Christian Morgenstern,

Der Seufzer

Ein Seufzer lief Schlittschuh auf nächtlichem Eis
und träumte von Liebe und Freude.
Es war an dem Stadtwall und schneeweiß
glänzten die Stadtwallgebäude.

Der Seufzer dacht an ein Maidelein
und blieb erglühend stehen.
Da schmolz die Eisbahn unter ihm ein –
und er sank – und ward nimmer gesehen.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN MORGENSTERN *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31).*

MR-173-1a / Arg-77-150 (2003-11-03 09:46:42)

[2] aŭ: tra la fandiĝanta glacio - kaj ĝin